

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2001



Someran kurson en Valamo partoprenis i.a. Kristiina, Timo, Katja kaj Sanna. (p. 12)

Interlinguisti vieraanamme, s. 4

Kiel slangumi Esperante, p. 7

Aŭtunaj Tagoj, p. 18

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteeri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Kaj-kaj

Nun estas trendo ke gefiloj aĉetas al iliaj maljunaj gepatroj komputilon kiel donaco. Al tio influas malaltiĝinta prezo de bazaj komputilpaketoj, ĉi-aŭtune ĉ. 5000 FIM. Komputilo estas ofte tiu aparato kiun maljunuloj, kiuj ”havas jam ĉion”, ne posedas. Ofte kialas por gevidvoj ke oni trovu novan vivpartneron per tiuj famaj babilejoj. Sed esperantistoj eble volas trovi per ilia nova komputilo ion kio koncernas ilian lingvan ŝatokupon.

Mi persone timis en 80-aj jaroj ke komputiloj kaj ĉiuj ties eblecoj estus mortfrapo al nia lingvo kaj movado. Ke ŝatokupo Esperanto iĝus tiel malmoderna per ties ĉapeloj, ke ĝi falus el vagono. Kiel ekzemple traduki ĉiujn komputikajn terminojn en Esperanton, ĉar ni esperantistoj ne povas unuanimi pri eĉ pli facilaj vortoj?

Sed mirakloj eblas ankaŭ en nia postmoderna mondo. Komputilo estas tre efika ilo

por propagandi Esperanton kaj informi disloĝantajn esperantistojn. ”Kio estis tiam kiam ne ekzistis Flora?”, oni povas demandi ankaŭ pri komputiloj. La produktmaniero kiu surbaziĝas sur komputilo ŝanĝas nian Esperanton tiel ke estiĝas mikro-Esperantioj anstataŭ unueca ĝenerala publiko Esperanta.

Ŝajnas ke la erao de amasaj Esperantaj organizoj faldas for. UEA kaj projekto ”Esperanta Civito” ofertas siajn neanstataŭigeblajn servojn ankaŭ en futuro. Sed ĉio kio vere okazas en tiuj mikro-Esperantioj estas rezulto de kunlaboro de libere kolektiĝintaj, ofte virtuale, esperantistoj. Al kio oni do bezonas amasajn meta-asociojn? Ilian laboron ni ĉiuj volas ja subteni, sed ne volas decidi kiu havus pli grandan aŭtoritaton inter ni, aŭ UEA aŭ projekto ”Esperanta Civito”. Prefere kaj-kaj.

Aimo Rantanen

Rapidnotoj pri Zagreba kongreso

Aliĝintoj: ĉ. 1700 ♦ Infana kongreseto: 56 infanoj el 15 landoj ♦ Kongresejoj: du apartaj, kun distanco de ĉ. 1 km, plus Infankongresejo ♦ Vetero varmega: ĉ. 30 gradoj ♦ Nova ZEO, statuo LA FUTURO, skulptita de Jesper Neergaard el itala marmoro, kun la teksto ”Esperanto – por monda komunikado en paco kaj libereco”

Finnaĵoj

La duopo Karkiainen-Pölkki premiita en Belartaj Konkursoj ♦ Aini Vääräniemi trapasis ekzamenon de ILEI/UEA ♦ Limdato de E-branĉo de Fabelkonkurso de Päättalo-instituutti ŝanĝiĝis, estante nun 31.8.2001 ♦ O.Buller demisios.

Belaĵoj

Bunta Nacia vespero kun nekredeble variaj dancoj, kostumoj kaj muziko ♦ Gejunularo ♦ Kroata naiva arto de Hlebine-skolo ♦ Koncertoj plurspecaj ♦ Maizokampoj, kverkarbaroj, arbejoj, vivantaj vilaĝoj, urba arkitekturo ktp.

Dankindaĵoj (i.a)

Senpaga veturado en urbaj tramoj kaj busoj ♦ Ŝtatprezidento Stjepan Mesiĉ en la Solena inaŭguro ♦ Ĉia helpo kaj gastamo de kroatoj, ĉu esperantistaj aŭ ne ♦ Brazilaj donacoj al ĉiu ĉestanto.

subjektive kompilis Saliko

Homo auxiliarus

Interlingua rantautuu Suomeen miehen iässä

Esperanto ei ole enää yksin hiekkalaatikollaan, vaan mukaan leikkiin on tullut **Suomen interlinguayhdistys!** Internetiin ilmestyi viime vuonna vakuuttavannäköinen sivusto (<http://www.kolumbus.fi/allkiv>), jossa interlinguan kehutaan olevan esperantoa tyylikkäämpi vaihtoehto kansainväliseksi kieleksi. Kahden leirin välisiltä yhteenotiltakaan ei ole täysin välttytty: kuumiksi käyneet yleisönosasto- ja sähköpostikeskustelut johtivat lopulta esperantistin ja interlinguanistin kohtaamiseen kahvilassa Helsingin sydämessä.



Allan Kiviaho toi interlinguan Suomeen.

Interlinguan puolesta esiintyvä **Allan Kiviaho** on lukenut herrasmies ja mestariluokan šakinpelaaja. Viime vuoden lopulla 65-vuotiaana eläköitynyt Kiviaho kertoo olleensa jo lapsena kiinnostunut semiotiikasta, symboleista ja merkkijärjestelmistä, mikä herätti myös innostuksen kansainvälistä kieltä kohtaan. Koulupoika-Allan hankki itselleen Vilho Setälän oppikirjoja sekä Kiekua ja Kaikua esperantoksi, mutta tarkempi kieleen perehtyminen sai jäädä odottamaan viime vuosiin asti.

– Viitisen vuotta sitten Euroopan Unionin kielikysymys alkoi tulla kriittisemmäksi, ja todettiin, ettei kielten tasa-arvo ole mahdollista Unionin laajentumisen jälkeen. Silloin aloin taas tutkia esperantoa, mutta minua häiritsivät sen epäesteettisyys ja erimaa-laisten lainasanojen sekamelska. Lisäksi erikoismerkit eivät vieläkaan toimi sähköpostissa ja Internetissä kaikesta vaivannäöstä huolimatta.

Kiviaho korostaa kirjoitetun kielen ulkoasun merkitystä lukijalle. Hatut ja rivien alta koukkivat j-kirjaimet eivät hivele hänen silmäänsä. 50 vuotta esperantoa kannattanut mies tuli toisiin aatoksiin ja löysi suunnitelmakielten kirjosta uuden ehdokkaan.

– Interlinguan sanastoon otetaan vain romanisille kielille sekä englannille yhteisiä sanoja. Sitä ei ole suunniteltu *a priori*, vaan sen on joukko huomattavia kielitieteilijöitä koostanut elävistä kielistä. Valmistuessaan vuonna 1951 interlingualle ei sitten ollutkaan sosiaalista tilausta, sitä ei tarvittu, kuten ei esperantoakaan, joka ei ikinä saavuttanut suuren kansan suosiota, Kiviaho muistuttaa.

– Eivät tällaiset kielet omilla ansioillaan pysty menemään läpi, vaan niillä pitää olla jokin muu ideologia takanaan, ja minun ideologiani on *euroidealismi* – olen Euroopan liittovaltion kannattaja, koska Eurooppa on tuomittu, jos se ei yhdistä synergisiä

voimiaan. Jos yhteiseksi kieleksi tulisi englanti, se olisi kauhistus kielen monien epäkohtien vuoksi: esimerkiksi suurta osaa mannereurooppalaisista erisnimistä ei voida esittää englanniksi lainkaan. Englanti levittää myös mukanaan kaikkein alkeellisinta ja banaaleinta kulttuuria. Eurooppalaisuuden tulisi perustua kreikkalais-roomalaiseen arvoihin.

Uusvanhaa pan-eurooppalaisuutta

Nykyisellään EU:ssa toimitaan pääosin englanniksi, ranskaksi ja saksaksi, joten eurooppalaiset joutuvat opettelemaan kolme kieltä todella pärjätäkseen, vaikka Yhdysvalloissa selvittää yhdellä. Kiviaho arvostaa kielitaitoa sinänsä, mutta pitää kohtuuttomana, että esim. teknikotkin joutuvat kamppailemaan useiden kieliopintojen parissa. Lisäksi valtakielten asema ei vastaa niiden puhujamäärää laajentuneessa unionissa.

– Ratkaisu on yksi yhteiseurooppalainen kieli. Jos esperanto valitaan, hyvä niinkin, vaikka se onkin paljon rumempi vaihtoehto kuin interlingua, mutta missään tapauksessa se älköön olko englanti. Kielestä on tullava jokaisen EU-kansalaisen toinen äidinkieli, mutta se ei saa merkitä kansallisten kielten kuolemaa, vaan päin vastoin siirryttäisiin kaksikielijärjestelmään, jossa kansallisia ja kansainvälistä kieltä osataan yhtä hyvin.

Kiviaho uskoo Saksan ja Ranskankin pian saavan tarpeekseen englannin kielen ylivallasta.

– Minulle *uuslatina* on lähtökohtana, koska latinasta tulleiden lainasanojen lukumäärä on niin läpikäyvä koko Euroopassa. Missään ei suhtauduta vihamielisesti latinaan, ja siitä johdetaan vielä tänäkin päivänä uusia sanoja tieteeseen.

Esperantoon tutustunut miljardöörin tytär Alice Vanderbilt Morris perusti v. 1924 IALA:n (International Auxiliary Language Association) kehittämään optimaalista suunnitelmakieltä.



Järjestö julkaisi interlinguan 27 vuoden lingvistisen työn jälkeen.

Kiviahoa ihmetyttää esperantistien tiukka kanta kaikenlaisia uudistuksia vastaan. Itse hän visioi tulevaisuuden ratkaisuksi interlinguaakin latinankaltaisemman kielen, johon voisi sisällyttää jopa yksin latinaan unohtuneita sanoja.

– Tarpeeksi lähellä latinaa oleva kieli kelpaa minulle heti, mutta se ei saa olla ruma ja keinotekoinen, sen pitää olla yhtä soinnikas kuin interlingua.

Koska interlinguan sanasto on nykyisellään koottu elävistä romaanisista kielistä, kuten ranska, espanja ja italia, sitä sanotaan ymmärtävän ensi näkemältä yli miljardi ihmistä.

– Ei se käytännössä ihan niin helppoa ole, mutta kyllä romaanisten kielten, ja jopa englanninkin, puhujat ymmärtävät suuren osan interlinguankielisestä tekstistä, Kiviaho täsmentää.

Ei vielä esperanton mittakaavassa

Kaikista eduistaan huolimatta interlingua on jäänyt pienten piirien harrastukseksi. Ehkä uudet ajat koittavat kielen rantauduttua Suomeenkin.

– No, olen perustanut tämän yhdistyksen saadakseni sellaista arvovaltaa edustaessani interlinguaa täällä Suomessa. Voidaanpa

sanoa, ettei täällä mitään mainittavaa liikettä vielä ole. Ruotsissa interlinguanisteja on luultavasti väkilukuun nähden eniten, lisäksi interlingua on alkanut levitä hyvää vauhtia Latinalaisessa Amerikassa. Laajempaan leviämiseen Euroopassa meiltä puuttuu organisaatio, joka käyttäisi tehokkaasti hyväkseen Internetin mahdollisuuksia, mutta keksällä tapahtuvassa Gdanskin 50-vuotisjuh-

lakokouksessa tätäkin toimintaa aletaan edistää, kielen Suomeen tuonut mies toivoo.

Jää on sulanut haastattelun myötä, ja Kiviaho myöntää hänen käsityksensä meistä esperantisteista muuttuneen nyt kun olemme saaneet kasvot. Ja samaa ihmislajiahan tässä edustetaan: *homo auxiliarus* – kansainvälisen yhteiskielen kannattajia.

Patrik Austin

Reformikieli tarjoaa uuden mahdollisuuden

Aivan kuten Volapük, joka oli ensimmäinen vakava yritys kansainväliseksi yhteiskieleksi, myös esperanto tuotti protestantti-ryhmiä jo luojaensa elinaikana. Mainittavimpia reformikieliä ovat **latino sine flexione** (valm. 1903), **ido** (1907), **occidental** (1922, myöh. *interlingue*), **novial** (1928) ja **interlingua** (1951). Onpa esperantoa reformoinut aivan viime vuosinakin mm. EU-viestintään toivottu **eurolang**. Kaikki tässä mainitut kielet muistuttavat perusajatukseltaan paljolti esperantoa, mutta ne käyttävät vain latinalaista aakkostoa ilman lisämerkkejä ja näyttävät yleensä ensikatsomalla puhtaalta italialta, latinalta tai espanjalta.

Esperantisteille tunnetuin lienee ido – ”paranneltu esperanto” – jonka manifestissa kiteytyvät aina uudelleen esiin nostetut kritiikin kohteet: päänvaivaa tuottavien erikoismerkkien poistamisen lisäksi j-moni-konpäätteet on korvattu, akkusatiivi ja adjektivien taivutukset on jätetty pois sekä sanastoa muokattu länsieurooppalaisemmaksi.

Toinen 2000-luvulle hengissä selvinnyt – ja siis tänä vuonna 50-vuotista taivaltaan juhlistava kieli on interlingua. Sen periaate eroaa idosta ja esperantosta siinä mielessä, että se tavoittelee luonnollisuutta ja välttelee

suunnitelmakielille tyypillistä kaavamaisuutta, muistuttaen siis alusta alkaen elävää kieltä. Interlinguanistit kuvaavatkin sitä ”romaanisten kielten hybridiksi”.

Monet idistit ja interlinguanistit ovat entisiä esperantisteja ja siten suunnitelmakielten suhteen kaksikielisiä. Ido- ja interlingua-maailmassa pyörivät esperantoliikkeestä lainatut kuviot kongressikäytännöistä pienlehdistöön. Esperantomailmassa liikkuva myytti reformikielten epäonnistuneisuudesta kieliprojekteina lienee epäoikeutettu: järkevämpi lähtökohta olisi luottaa, että jos kerran kieltä käytetään, sen täytyy olla käytökelpoinen.

Reformikieliet antavat uutta toivoa niille, jotka pettyvät, kun esperanton leviäminen maailmankieleksi ei sujukaan toivottuun tahtiin. Uusien yritysten jäätyä vuorostaan pienten piirien suosioon kannattajat yleensä pikku hiljaa kyllästyvät ja siirtyvät muualle. Uudistushakuisuus on käytännössä osoittautunut konservatiivisuutta hankalamaksi asenteeksi: kun käyttäjäryhmä koostuu reformisteista, kieliopista on vaikea päästä yhteisymmärrykseen. Täydellinen kieli ei valmistu koskaan.

Patrik Austin

Teksto en tri lingvoj

(Interlingua:) Si nos considera, que hodie plure obras scientific, specialmente libros de insenio, se trova traducite in dece-duo o plus linguas estranietunc nos comprende qual immense quantitate de labor on economisarea, si on poterea tanto generalmente comprender libros ubicumque apud le globo como assi notas musical o tabulas de logarithmos.

(Ido:) Se ni konsideras, ke cadie sat multa ciencala verki, specale lernolibri, tradukesas aden dekedu o plu multa stranjera lingui, ni komprenas, qua enorma quanto de laboro povus sparesar, se libri omnaloke sur la terglobo povus komprenesar tam generale, kam exemple muzikal noti o logaritmal tabeli.

(traduko:) Se ni konsideras, ke nuntempe kelkaj sciencaj verkoj, precipe lernolibroj, estas tradukitaj en dek du aŭ pli da fremdaj lingvoj, tiam ni komprenas, kiom granda kvanto da laboro povus esti ŝparata, se libroj ĉie en la mondo povus esti tiel ĝenerale komprenataj kiel ekzemple la muziknotoj aŭ logaritmaj tabeloj.

Fonto:

H. Jacob: Otto Jespersen: his work for an international auxiliary language (Loughton, 1943)



Slango: Ĉesu talpi, ek al sukaj babiloj!

Ĉu vi senprobleme trovas bonajn esperantajn esprimojn por “nynny”, “vamppi”, “hörhö”, “luuseri”? Ĉu foje mankas al vi vorta vario en esperantaj babiloj? Ĉiam nur “ebria” kaj “enamiĝinta” dum en la finna oni estas jurrisa, kännissä, keitos-sa, seilissä kaj pihkassa, lätkässä, lääpä-lään...? Kiel parolus junularo en esperantlingva romano?

La celo de la nova slangejo de Doktoro Espo estas helpi homojn uzi pli vivan kaj nuancoriĉan esperanton. Kaj trovi vortojn kaj esprimojn kiuj ofte mankas en vortaroj: tabuaj vortoj, seksorilataj vortoj, sakroj ks. En la slangejo vi povas trovi ankaŭ tute sentabuajn, rave freŝajn esprimojn kiel ”Sal’kaj pipr’ ”(por saluti) aŭ ”ĝis kaj kis’ ”.

La slangejo funkcias nur de kelkaj monatoj, sed jam troveblas tie baza babilstila vortaro. Funkcias ankaŭ diskutforumo por proponoj, aldonoj kaj diskuto.

Kaj kiu estas la mistera Doktoro Espo? La sama lingvema Doktoro, kiu drumas sur la disko de Dolcxamar. Eĉ se malofte renkontebla persone, lian unikan stilon vi povas ĝui en www.nettie.fi/droEspo

Mikä ei tapa, se vahvistaa. Idon ja interlinguan tunnukset säilyvät yhä 2000-luvulla. Linkkejä maailmankielisivustoihin on Helsingin esperantoseuran sivustolla os. <http://www.sakari.f2s.com/lingvemul.html>

Flo – animo de esperanta muzikmondo

En la IJK 1989 en Kerkrade, Nederlando, mi renkontis malaltan viron, franckatalunan. Li parolis al mi pri sia ideo starigi esperantan muzikeldonejon, esperantlingvan rok-muzikan gazeton, esperantan Rok-Asociation... Preskaŭ certe unu plia nubkapulo kun grandaj projektoj neniam realigotaj, mi tiam pensis. Mi eraris. *Floréal Martorell* feliĉe realigis siajn ideojn. Li fondis Esperanto Rok-Asociation, *Eurokka*, diskeldonejon *Vinilkosmo* kaj rok-muzikan gazeton *Rok-Gazet'*. Sendube, sen li nia esperanta muzikmondo estus seka kaj malfekunda kiel sahara sablo.

Riitta: Flo, rakontu al ni kiel fartas momente *Eurokka*?

Flo: La plej grava projekto ĉijara de *Eurokka*, post pasintjara KAFE, estis labori pri la programo de la franca IJK kaj festivalo *Artoj kaj lingvoj*.

Riitta: Kio pri *Rok-Gazet'*? Mi esperas, ke la bonega *Rok-Gazet'* ne mortis.

Flo: Ne, sed *Rok-Gazet'* longe paŭzis pro diversaj kialoj, i.a. manko de vera ĉefredaktisto, ĉar dum tro longa periodo mi mem faris ĉion kaj ne estis tempo plueldoni ĝin. Antaŭ du monatoj nova teamo stariĝis kaj transprenis la taskon. En la teamo estas i.a. *Tony Guyot* kaj *Rikardo Cash* el Francio kaj *Niko Vološin* el Ukrainio. La nova teamo jam laboras por la 10a *Rok-Gazet'* kiu entenos amasegon da novaĵoj kaj informoj.

Riitta: Kia bona novaĵo! Kaj kio pri *Vinilkosmo*?

Flo: Post la apero de Kolekto 2000 aperis du albumoj: tiu de *Kaj Tiel Plu* kaj tiu de *Esperanto Desperado*.

De tiam estis longa paŭzo, ĉar estis granda laboro en la studioj en Donneville, kie mi konstruas sonstudion. Nun ĝi pretas, preskaŭ. Temas pri 16-traka 1-cola analoga kaj pri ĝis 24-traka diĝita rekte al disko surbendigstudio, kun sufiĉe multaj periferiaj efektiloj kaj masterizeblecoj ktp.

Riitta: Hmmm... Bonege, gratulon pro la studio, sonas tamen iom komplike... Rakontu al ni, kiuj ne multon komprenas pri trakoj kaj masterizeblecoj, kial vi konstruas surbendigstudion?

Flo: La celo estas disponigi al bandoj kaj artistoj, esperantistaj kaj ne-esperantistaj, profesion kaj kvalitan surbendigadon je tre favoraj kondiĉoj.

Riitta: Kiel stas pri la nunaj projektoj de *Vinilkosmo*? Kiu disko sekve aperos?

Flo: Antaŭ nelonge ni interkonsentis kun diversaj artistoj distribuadon de novaj diskoj; temas i.a. pri *Krio de Morto* (Alternativa subgrunda roko el Pollando), *Tjeri Faverial* (intimeca latinĵazo kaj europeca kanzono el Francio), nova albumo de *Solotronik* (elektronika teknomuziko el Hispanio) kaj pluraj aliaj.

Venonta disko distribuota de *Vinilkosmo* estos la albumo *Meven* de la *Bretona Esperanto-Koruso*, disko kiun ni fabrikigos. Produktis kaj eldonas la Bretona Federacio de Esperanto.

Venonta KD produktota kaj eldonota de *Vinilkosmo* mem estos la albumo de *JoMo* sola. Fakte estos ankaŭ la unua produktaĵo surbendigita en la "esperanto-Muzik-studio" de *Vinilkosmo*! Imagu la unua surbendigo en la studio estos esperanta!!! Ne malbona inaŭguro por la studio ĉu ne ?

Riitta: Splende! Kaj kio sekvos la inaŭguron?

Flo: Poste estas pluraj aliaj projektoj: Hiphopa albumo de *Eterne Rima* el Pollando, *Elektronika-tekno-kompil'* kun multaj novaj artistoj, inter ili *DĴ Kunar*, albumo de la franca kanzonisto *Morice Benin*, albumo de itala mondmuzika bando *FBA*, ktp...

Riitta: Kiaj estas la ĉefaj novaĵoj kaj tendencoj en la espa muzikmondo momente?

Flo: Kun artistoj kiaj *DĴ Kunar* kaj aliaj kaj plej laste *Eterne Rima* hiphopo kaj ties influado atingas espan planedon! Ne estas malbone, ĉar vere mankis por la junularo. Se ni sukcesas eldoni la albumon de *Eterne Rima* tio estos la unua albumo de hiphopa muziko. Tio ne estas tre nova muziko, sed por spio jes! Same pri la *Elektronika tekno kompil'*, projekto en kiu aperos plej divers-tendencaj aktualaj muzikoj kiel tekno, trenco, denco, haŭzo, drumenbaso, bigbito. Pri la projekto kulpas ĉefe *Gunnar Fischer* kaj mi. Ĝi entenos artistojn kiel *Solotronik*, *MHZ*, *Magnus*, *Andreas Viklund*, *DĴ Kunar*, *Esperanto*, *Igor*, ktp...

Riitta: Proksimume kiom da espaj diskoj aperas ĉiujare?

Flo: Tio estas ne antaŭvidebla. Dependas de la bandoj kaj artistoj. Sed ankaŭ de la esperantistaro mem kaj kompreneble de la financostato de *Vinilkosmo*. Se esperantistoj interesiĝas pri espomuziko, tiam ili aĉetas, kio ebligas antaŭenpaŝi kaj plu eldoni novajn produktaĵoj. Se ne estas intereso tiam la afero stagnas kaj bremsas la eldonadon. Fakte la mono enkasigita de unu produktaĵo utilas por fari novan. Tiel ni sukcesis fari ĝis nun...

Riitta: Kio, cetere, estas kutima vendokvanto por espaj diskoj?



Flo prelegis pri esperanta muziko en KEF2000.

Flo: Ni kutime eldonas po 500 ekzempleroj de ĉiu albumo, sed ni reeldonis dufoje tiun de *Jacques Yvart*, unufoje tiun de *JoMo kaj Liberecanoj*, kaj eble baldaŭ ni devos reeldoni tiun de *Persone "...sed estas ne"* kaj *Kaj Tiel Plu*.

Ni evitas grandajn stokojn – tio malebligas eldonadon de aliaj artistoj.

Riitta: Ĉu multaj ne-esperantistoj aĉetas esperantlingvajn diskojn?

Flo: Ne! Esceptoj estas la disko de *Jacques Yvart* kiu multe disvendiĝis, ĉar li kantis kantojn de *Georges Brassens* en esperanto, *JoMo kaj Liberecanoj*, kiu disvendis multajn diskojn dum siaj koncertoj, kaj *Kaj Tiel Plu*, kiu multe disvendis en Katalunio al ne espistoj.

Riitta: Kio igis vin originale okupiĝi pri esperanta muziko?

Flo: Antaŭ ol okupiĝi pri espa muziko mi okupiĝis pri loka rokmuziko kaj kiam mi malkovris esperanton vidante ke estis preskaŭ virga tereno tiukampe, mi simple emis kultivi ĝin kaj alporti mian sperton por la espomuzikkulturo...

Riitta: Feliĉe tiel! Sed de kie venas la kuraĝo por tiom freneza projekto kiel profesia eldonisto de espa muziko? Kaj ĉu *Vinilkosmo* efektive estas via ĉefprofesio?

Flo: Simple ĉar neniu vere kuraĝis eldoni aktualajn, rokajn, alternativajn, subgrundajn ktp. muzikojn en esperanto por junularo. *Vinilkosmo* estas mia ĉefprofesio de 1999.

Riitta: Ĉu vi eldonas ankaŭ ne-esperantlingvajn diskojn?

Flo: Ne! Jam estas sufiĉe da laboro kun la esperantaj eldonoj! Tamen kiel mi diris, en la studio ni surbendigis ne nur esperantajn bandojn kaj fabrikigos ankaŭ por tiuj bandoj la diskojn, sed ni ne produktos nek eldonos nek distribuos ilin. Temo pri memproduktaĵoj de la bandoj mem. Tio ja postulos malpli da laboro kaj estos monenspeza, tio helpos por financi ontajn espoproduktaĵojn!

Riitta: Laste, Flo, diru al ni kiam la unuaj espomuzikistoj eniros la Euro Top 50?

Flo: Certe tio ne venos de ni! Sed se iu artisto emas tien eniri kial ne. Ni ne bremsos... Kaj tio povas esti bona por espo. Ni atendas ke *Dolcxamar* faru verkon enireblan en Top 50-on !

Trovu rete:

Rok-Gazet'

<http://www.sciuro.demon.co.uk/rokgazet/>

Vinilkosmo

<http://www.vinilkosmo.com>

Muzikterminaro en esperanto

www.concinnity.se/bertilow/roko

TTTpaĝoj de Zav' pri panoramo de esperantomuziko

<http://dmoz.org/World/Esperanto/Muziko/MP3-dosieroj/>

Kelkaj vizitindaj bandopaĝoj

Dolcxamar

www.nettie.fi/dolcxamar

Esperanto Desperado

www.esperanto.dk/desperado

Persone

www.concinnity.se/bertilow/persone

Por diskoaĉetoj

www.esperanto.fi/fejo/diskejo

La tono de milito

E. M. Rasku,

Pri la frato Esko.

2001.

En esperanta, finna kaj hungara lingvoj.

Ĉi-libreto enhavas ok fragmentojn pri militjara vivo de finna familio. Ilustraĵoj kiujn desegnis Aija kaj Tiina peras bone kaj sentoplene tiutempan vivon. Antaŭ milito la fratoj Rasku ludis violonon, studis por abiturienta ekzameno kaj ŝatokupis pri sporto. Milito ŝanĝis ĉion. Tio speguliĝas de lastaj folioj. Milito evoluis ankaŭ la pensmanieron de aŭtoro al doktrinoj de Sokrato kaj Jesuo. Li ekesperis, ke internaciaj rilatoj okazu amikece kaj respektante unu la alian.

Estas bone rememorigi pri tiu epoko. Saĝuloj diras, ke indas verki nur pri amo, milito aŭ morto. Erkki Rasku elektis militon kaj familian amon. La tono de milito flustras ankaŭ nun fone. Nenio strebo eblas subpremi ĝin, por ke nia popolo ne forgesu la teruraĵojn de milito kaj volu novan.

AR

Informpaketo por ni

ESPERANTO aktuell.
Sondernummer (specialnumero).
April 2001.

Kiam la broŝurgrupo de EAF planis novan varbilon, ĝi diskutis multajn detalojn kiuj efektiviĝas nun en germanlingva informpaketo pri Esperanto. Kiel en Finnlando ankaŭ en Germanio oni volis "fari ion". La informkajero de Germana Esperanto-Asocio estas impona. Presita sur plejkvalita prespapero kie la multaj ilustraĵoj reprodukteblas eksterordinare. La specialnumero volas diri al leganto kaj ankaŭ diras, ke ĉio estas en ordo en la germana Esperanto-movado.

Riitta Hämäläinen diris al nia broŝurgrupo ke ankaŭ malgranda firmao povas pretendi esti granda per altkvalitaj broŝuroj, informpaketoj kaj varbkampanjoj. La informpaketo de GEA estas zorge kompilita, la tekstoj kiuj prezentas detale "Esperanton en EU, esperantlingvan kulturon, datojn kaj faktojn pri historio de Esperanto kaj germana Esperanto-movado, germanan literaturon en Esperanto, Germanan Esperanto-bibliotekon kaj fakajn asociojn Esperantlingvajn".

Mi nur dubas ĉu periodaĵformato povus esti konvena por tiutipa informpaketo. La ideo de Riitta, ke informpaketo de EAF kon-

sistus el ĝenerala, almana broŝuro kaj aliaj specialaj broŝuroj estis laŭ mi preferinda kaj kiel pli malmultekosta pli efektivebla por nia malgranda landa asocio. Specialnumero de iu E-periodaĵo povas esti bona por konvinki la esperantistojn, kiuj legas la periodaĵon regule, sed mi pensas ke por ekstera publiko tiu ne bedaŭrinde sufiĉas. Periodaĵon la leganto foliumas kaj leginte ĵetas for. Periodaĵa numero estas ankaŭ malfacile ĝisdatigebla. Tiuj estas problemoj kiujn mi pensis legante la specialnumeron de GEA.

Mi tute ne kontraŭstaras la ideon, ke eble Esperantolehti, kiel estas proponite, havus varbilon kiel kromfolio en la mezo de ĉiu numero. Raita Pyhälä konatiĝinte kun tiutipa kromfolio de franca Esperanto-junularo proponis samtipan varbilon al mi. Iu alia finna esperantisto faris la saman proponon. Kiu do farus la kromfolion? Ĉu FEJOanoj havus energion kaj eblojn kompili tian varbilon pri fundamentaj faktoj konsiderante Esperanton. Mi bedaŭrinde ne havas tempon por plia redaktlaboro. Inter FEJOanoj ekzistas ja profesie kapablaj personoj fari tiun laboron.

Aimo Rantanen

✉ Korespondi deziras

Juna studento pri lingvoj deziras korespondi en la latina, Esperanto aŭ aliaj lingvoj pri ĉiuj temoj. Adreso: Sergej Kalegin, Str. Gorkogo 28, 385060 Chanskaja, Majkop, Adygeja, Ruslando.

Veronika (9-jara) ŝatus korespondi kun finnaj geknaboj. Ŝi tre ŝatas muzikon kaj vizitas ĵazbaletan klubon, ĉar ŝi ŝatas danci. Ŝi atendas viajn leterojn ĉi adrese: Veronika Dobran, Tiszaszentimre 5322, Gargya u. 8, Hungario.

Someraj kursoj en Valamo 1 – 5.7.2001

Denove ni kolektiĝis por la someraj kursoj de EAF en la monaĥejo Valamo en Heinävesi. Diferenco rilate al la pasintjara kurso estis, ke nun ekzistis tri grupoj anstataŭ pasintjaraj du. Komencantan grupon, kiu konsistis el 7-8 studentoj, instruis Sylvia Hämmäläinen kaj daŭrigan grupon, kiu konsistis el 8-9 studentoj instruis Atilio Orellana Rojas el Nederlando. Diskutan grupon gvi-



Jack kaj Rose en Titanic aŭ Pipsa kaj Katja en MS Sergei?

dis Tiina Oittinen. Feliĉe ankaŭ ni diskutuloj rajtis ĉeesti en kelkaj studhoroj de Atilio.

La kursoj komenciĝis en unu varmega dimanĉo. La rektoro de la popola instituto, Sirpa Anttonen bonvenigis nin. Pekka "Pietari" Virtanen rondirigis nin sur la korto de la monaĥejo. Li rakontis pri la historio kaj nuntempo de la monaĥejo. Ni aŭdis i.a ke estas tute normala afero en- kaj elveni dum la ortodoksaj diservoj.

En interkona vespero Jukka Laaksonen rakontis kiel la patro de Vilho Setälä, E.N. Setälä influis al la aranĝado de la ortodoksa eklezio de Finnlando. Sylvia kaj Tiina muzikis kaj ni kantis kune.

Lunde en la programo estis unuhora ŝipvojaĝo en la lago Juojärvi. Ni vizitis rokegon, kiu estas limŝtono de la packontrakto de Täyssinä (1595). Vespere ni kolektiĝis en legosalono por malstreĉiĝo. La poemo, kiun Atilio deklamis, pensigis nin. Li malstreĉigis tiel profunde, ke kelkaj ne volis vekigi. Por la fino de la vespero kelkaj iris por saŭni kaj naĝi, kaj tiam okazis akcidento.

En mardo ni marŝis 2,5 kilometrojn al la Pilgrima kruco, kie Paavo kaj Sirpa regalis nin per kafo en la bela naturo. Dum la vespero ni povis "gustumi" vaporon de la lagoborda saŭno kaj friti kolbasojn.

Ankaŭ en merkredo ni ekskursis en naturo, ĉifoje sub gvidado de Paavo Immonen. Ni iris al la tombejo de la monaĥejo kaj laŭ preĝo-pado en arbaro. Tie ni povis refreŝiĝi per benita akvo de fonto, kelkaj eĉ kunprenis akvon. Dumtempe parto de la kursanoj vizitis la monaĥinejon Lintula. Dum la taga kafo ni ricevis datrevenan kukon de unu kursano. Vespere ni estis regalitaj per abun-

dega Slava manĝotablo. Frandoplandoj estis multe pli ol dek; i.a. malvarme fumajita viando de alko kaj fraja ĵeleo. Dum la manĝado Paavo rakontis pri la produktado de vinoj en la monaĥejo. Ankaŭ vinoj estis servitaj. Ni aŭdis poemojn kaj finne kaj Esperante, kaj muzikon per violono kaj fortepiano.

Ankoraŭ en la ekira tago ni studis tri horojn.

La kursoj okazis dum vere varmega tempo, tiel ke la studmotiviĝo eble malaltis iomete pro la varmego de la studsalonoj. Sed feliĉe ne pluvis krom kelkaj gutoj.

Adiaŭa tempo estis denove trista. Sed feliĉe la kursoj okazos denove venontsomere en la sama loko kaj datoj kun la samaj bonaj instruistoj.

Terhi Laaksonen

”Mi certe iros ankaŭ venontjare!”

La tradicia somera esperantokurso de EAF okazis en la monaĥejo Valamo tuj komence de julio. La kursojn partoprenis entute 28 gelernantoj, inter ili stipendie kvar novaj FEJO-anoj. Katja, Pipsa kaj Timo rakontas pri siaj kursospertoj kaj impresoj en la hel-sinka trinkejo Zetor dum aŭgusta FEJO-vespero.

Katja: Estis tre amuze! Tre bona loko, trankvila kaj bela. En la gastejo estis bona etoso.

Pipsa: Ĉarme kaj ĝuinde. Estis bona vetero. Estis tre malŝtreĉiga semajno. Mi vere bezonis tion. Kaj estis ankaŭ sana sperto. Imagu, mi fumis nur du cigaredojn dum la tuta semajno!

Timo: Jes, estis tre agrable. La manĝaĵoj estis bonaj. Valamo estis trankvila loko. Pro tiu kaŭzo mi ŝatis la kursolokon.

Katja: Kaj estis vere ĉarmaj civilservantoj tie...

Pipsa: Ho jes, unu vere bonaspekta knabo!

Timo: Por mi estis la unua fojo, kiam mi ricevis instruadon. Antaŭe mi lernis el libroj. Mi partoprenis la elementan nivelon. La instruado estis bona. Parte estis malnovaj aferoj, sed granda parto estis nova scio por mi. Mi lernis multon.

Katja: Mi kaj Pipsa partoprenis la daŭrigan nivelon. Atilio parolis sufiĉe malrapide. Kaj ne estis kiel en lernejo, nur ekzercoj pri prepozicioj. Ni havis interesan temon: biodiversecon. Kaj ni legis tekstojn. Foje estis amuz-



Marsano aŭ Timo? Malantaŭe klara kaj nedisputebla trovo pri nifo (=neidentifita fluganta objekto).

aj ekzercoj. Ni fiksas gluaĵojn sur unu la alian. Kaj ni havis vortoekzamenojn. Ni multe ridis dum la lecionoj. Eble unu leciono pli ĉiutage estus bone. Aliflanke estis ankaŭ bone fari aliajn aferojn, ĉar la ĉirkaŭaĵo estis vere bela.

Pipsa: Jes, Atilio estis tre ĉarma instruisto.

Katja: Cetere, Timo, vi havis ĉiujn virojn en la elementa kurso! Ni estis grupo da kokinoj.

Pipsa: Dum lecionoj ni parolis esperanton, sed en libertempo ni parolis la finnan.

Katja: Sed estis bone, ke ni devis paroli kun pli spertaj esperantistoj de la konversacia grupo. Foje min tamen iom surprizis fortaj lingvaj debatoj inter pli spertaj esperantistoj.

Pipsa: Unu el la plej ĉarmaj spertoj estis maljuna Anastasia. Ni sidis kun ŝi horojn en preĝejo kaj aŭskultis ŝiajn rakontojn.

Katja: Kaj la plej malagrabra sperto estis mia genuo. Mi glitis sur pado kaj preskaŭ rompita la genuon. Synnöve bone flegis min. Mi eĉ devis viziti malsanulejon en Helsinko, sed feliĉe estis nenio grava kaj mi povis reveni. Mi perdis nur unu lecionon finfine.

Katja: Ankaŭ la cetera programo estis bona. Ni i.a. ekskursis sur ŝipo Sergei. Estis interese konatiĝi kun monaĥejo. Kaj en la vespera programo Pipsa kaj mi prezentis poemojn de Jorge Camacho! Mi prezentis esperante kaj Pipsa finne.

Pipsa: Mi certe iros ankaŭ venontjare! Mi nepre rekomendas la kurson al ĉiuj.

Brile aprile

15.-21.4. okazis en Meksikurbo la 5a Tutamerika Kongreso de Esperanto kun la temo “Ameriko, unu kontinento, diversaj historioj”.

Ĝia rezolucio por la ekstera publiko tekstas jene:

“En ĉi tiu semajno, kiam reprezentantoj de la ŝtatoj el la tuta Ameriko preparolas la komercan unuiĝon de la kontinento, ni, parolantoj de Esperanto el ĉiuj regionoj de Ameriko kaj el aliaj mondopartoj, alvokas al alia unuiĝo:

- ◆ unuiĝo sur bazo de komunika egaleco, kiu respektas la naciajn kaj etnajn diferencojn kaj inter kaj ene de la ŝtatoj;

- ◆ unuiĝo sur bazo de transnacia edukado, kiu konigas al infanoj diversajn vidpunktojn pri la historio kaj instigas ilin al senpera konatiĝo kun aliaj kulturoj;

- ◆ unuiĝo sur bazo de lingva kaj kultura diverseco, kun aparta atento al la protektado kaj disvolvado de la indiĝenaj kulturoj.

Tia Ameriko eblas kaj indas. Ni invitas ĉiujn homojn aliĝi al ni por ĝia konstruado.“

Antaŭguston de tia Ameriko spertis 169 partoprenantoj el 23 landoj dum la kongreso kaj tri-deko el ili dum la postkongreso en la urbo Oaxaca (Oaĥaka). Rememoroj pri tiuj du brilaj aprilaj semajnoj kun kelkaj malnovaj kaj multaj novaj entuziasmaj kaj laborpretaj, seriozaj sed tamen humurplenaj geamikoj restos heligaj kaj varmigaj en mia koro.

Jam antaŭ la oficiala malfermo – kaj ne pensu, ke oni entute malŝparis tempon, preskaŭ ĉio iris akurate laŭ la horaro! – okazis du laborsesioj kaj la Interkona Vespero kun amuzaj ludoj, gvidataj de Amanda Higley. (Salutojn de ŝi al ĉiuj konatuloj!)

Antaŭ la oficiala inaŭguro ni ĉeestis malfermon de konkursa ekspozicio de desegnaĵoj senditaj al la porinfana Belarta Konkurso kun la temo “Kiel mi vidas mian landon“. La kongreso

mem komenciĝis per rava indiĝena ceremonio en la naŭatla lingvo, kun konka muziko, buntaj petaloj, maizospikoj kaj kukurboj. Post la oficialaj paroladoj reprezentantoj de la diversaj landoj enmetis en vazon meze de la podio floron kiel simbolon de la unuigo de ĉiuj landoj ne nur en Ameriko sed en la tuta mondo.

Dum la semajno la organizantoj rakontis multflanke pri historio kaj kulturo de sia lando. Ni aŭdis prelegojn pri “Azteka Ŝtono“, “Arki-tekura Tradicio en Meksikio“ kaj “Akapulko, ekzemplo de tutmondiĝo en la XVI kaj XVII jarcentoj“. Ni povis ankaŭ konatiĝi kun meksika poemantologio “Flor’ kaj kanto“ kaj tre interesa, ĵus esperantigita libro “Tra l’okuloj de l’venkitoj”, kiu pritraktas la konkeron de Meksikio fare de hispanoj el la vidpunkto de la indiĝenoj baze de iliaj propraj skribaĵoj. Ĝin prezentis entuziasme la verkinto Miguel Leon-Portilla kaj la tradukinto d-ro Juan Jacobo Schmitter-Soto.

La kongresan temon prezentis Mark Fettes. Okazis ankaŭ diskutsesio pri versioj de historio, kiuj estas (mis)instruataj en diversaj landoj de Ameriko. Kelkaj partoprenantoj interesiĝis formi laborgrupon por pli profunde pritrakti la temon.

Pri nuntempaj E-movadaj temoj prelegis Michela Lipari, Bill Maxey, Vladka Chvatalova


kaj Johano Bachrich. La UEA-Komisiono por Ameriko okazigis sesiojn gvidatajn de Atilio Orellana Rojas pri junularo, informado, instruado, aplikado de E-o, financoj kaj strategia plano. Ni aŭdis ankaŭ prelegojn pri la historio de la E-movado en Kolombio, Meksikio, Kostariko kaj Kubo.

Krome estis prelegoj pri aplikado de interretaj rimedoj, Esperanto-filatelo, diabeto kaj endokrinaj malsanoj, homa genaro, doktrino de Bruno Gröning kaj pri bahaa kredo en la Amerika kontinento.

Dum la kongreso okazis ‘Fulmokurso de E-o’, prezentado de la ekzamenoj de ILEI/UEA kaj la ekzamenoj mem, A-seminario pri Csehmetodo, prezento de la filmo “Esperanto, pasporto al la tuta mondo“ kaj prelego pri ties aplikado. Oni povis eĉ iom lerni la naŭatlan, unu el la lingvoj parolataj en Meksikio.

En la programo estis ankaŭ ekumena diservo, gvidata de pastro Claramunt, kun fervora kaj belsona kontribuo de infana kvarteto.

En la distra parto ni ĝuis muzikon kaj dancojn de Meksikio. Dum la koncerteto de la koruso “Gepatroj kaj geamikoj“ ni eĉ celebris datrevenon de du kongresanoj en meksika maniero. Ankaŭ la partoprenantoj povis kontribui dum Internacia vespero kaj oratora konkurso.



Sur la pinto de Monte Alban: James Rezende Piton (Brazilo), Takako Matsuura (Japanio), Normand Fleury (Kanado), Anja Karkiainen (Finnlando) kaj Luis Cantillano (Kostariko)

Pro samtempeco de pluraj programeroj ne eblis aŭskulti ĉion interesan, sed pri la plej multaj programeroj raportis poste “Kuriero de la Nova Mondo“, kiu aperis kvarfoje dum la kongreso redaktita de James Rezende Piton el Brazilo.

Ne malplej interesaj estis la ekskursoj. En Xochimilco (Soĉimilko) ni veturis per kvar boatoj kun la nomoj ‘Esperanto’, ‘Ludoviko’, ‘Klara’ kaj ‘MEF’ (= Meksika E-Federacio) tra kanaloj, kiuj ekzistis jam, kiam la urbo nomiĝis Tenoĉtitlan kaj estis la ĉefurbo de la Azteka Imperio. Tie ni pasigis belan posttagmezon manĝante, aŭskultante al muzikistoj en aliaj boatoj, kantante kaj eĉ dancante la E-version de la bambo...

Dum tuttaga ekskurso ni surgrimpis enormajn antikvajn piramidojn en Teotihuakan. Promenante en la centro de Meksikurbo ni vizitis la urbodomon kaj la prezidentan palacon kun imponaj murpentraĵoj de Diego Rivera, arkeologian areon kaj muzeon de la iama azteka ĉefa templo kaj la katedralon. La lastan tagon ni pasigis en la enorme granda kaj belega Nacia Antropologia Muzeo kaj en Kojoakan, urboparto de artistoj.

Dum la busveturo al la postkongreso al Oaxaca laŭ montara vojo ni vidis i.a. la antaŭ nelonge erupciintan, nun trankvilaspektan vulkanon Popokatepetl. Alveninte al la belega urbo ni konatiĝis kun tieaj esperantistoj, ĝuis abundajn menuojn, foje kun ekzotikaj pladoj (akridoj fakte ne malbongustas), vizitis muzeojn kaj preĝejojn, partoprenis esperantlingvan diservon kaj malfermon de ekspozicio pri Esperantaj temoj en la Filatela Muzeo. Kiel jam en Meksikurbo ankaŭ tie eblis ricevi sur siajn poŝtaĵojn specialan prikongresan stampon.

Dum ekskursoj ni vizitis antikvajn mistekajn konstruaĵoj kun ‘grekstilaj’ kalkŝtonaj mozaikoj en Mitla kaj ĉirkaupromenis la plej grandan arbon de la kontinento, la gigantan 2000 jarojn aĝan cedron “el Tule“. En entrepreno de zapoteka familio ni vidis teksadon de belegaj lanaj mur-tapiŝoj kun komplikaj figuroj en koloroj

produktitaj per farbaĵoj el la naturo. En farejo de mezkalo, loka forta alkoholaĵo, oni klarigis al ni la proceson ekde la kreskigo de ĝia esenca ingredienco, precipa agavo, ĝis la trifoje destilita fina produkto, kies fuman aromon ni kompreneble ankaŭ gustumis.

Tre interesa estis la vizito al Monte Alban, parto de la “monda heredaĵo“ de Unesko, iama sankta urbo de zapotekoj sur ebenigita monto-pinto, forlasita ĉ. la jaro 700 pro nekonataj kialoj. Ankaŭ multo alia pri tiu loko estas nekonata, ekzemple la signifo de strangaj surmuraj figuroj nomitaj “dancantoj“ kaj de la pilkludo, kiu okazis en tieaj du ludejoj kaj kies gajnintoj (jes, vere!) estis oferitaj al la dioj. Poste deklivo de tiu monto estis uzata kiel tombejo kaj tie estis antaŭ nelonge trovataj valoregaj arkeologiaĵoj.

Por ni estis aranĝita miniatura tipa regiona festo nomita Gelageco, kun multaj dancoj, dum kiuj la gastoj ricevis simbolajn donacetojn; kafon, ĉokoladon, mezkalon, ananasojn kaj amuzajn ‘pajlajn’ ĉapelojn.

Revenante al Meksikurbo ni haltis por manĝi kaj iom promenadi en la urbo Puebla. Tie mi disiĝis el la grupo por daŭrigi mian viziton private, iom laca pro inundo de impresoj kaj novaj scioj kaj la multa grimrado kaj marŝado en la varmeĝo kaj maldensa aero de la altejoj, sed treege kontenta kaj feliĉa pri mia partopreno.

La LKK meritas gratulon pro la plensukcesa aranĝo kaj dankegon pro sia enorma laboro. Tlahzo ca ma ti!*

Anja Karkiainen

Fotoj pri la kongreso estas rete atingeblaj en la adresoj:

<http://br.geocities.com/ctcampinas/take2001>

(de James Rezende Piton)

<http://Take2001.8k.com/index.htm>

(de Enrique Ellemberg)

<http://web.mit.edu/quark/Public/meksiko/>

(de Jacob Schwartz)

* naŭatle: dankon

Prepositiot TRA, TRANS JA CIS

Yritetäänpä ymmärtää TRA-preposition viestiä kesäisin esimerkein:

Tra la klara akvo Petro vidis sian horloĝon sur la sablo de la fundo. Kirkkaan veden läpi Pekka näki kellonsa hiekkapohjalla.

Panjo ofte rigardadis tra la fenestro. Äiti katsoi usein ikkunasta.

La suno brilis sur la bebon tra inter la branĉoj. Aurinko paistoi oksien lomasta vauvaan.

Subite ekbrilo de fulmo trakuris la ĉielon. Äkkiä leimahti salama yli taivaan.

Ja sitten TRANS, joka viestittää ”yli, toiselle puolen, poikki”:

La knabinoj deziris remi trans la lagon. Tyttöjen teki mieli soutaa järven yli toiselle rannalle.

La infanoj ĵetis la pilkon trans la muron. Kiu nun iru tra la pordego kaj pardonpetu? Lapset heittivät pallon muurin yli. Kuka nyt menisi portista ja pyytäisi anteeksi?

Jos TRANS-preposition perässä on perusmuoto ilman akkusatiivin N:ää, niin merkitys on ”toisella puolella, tuolla puolella”:

Trans la lago nestis cignoj. Järven toisella rannalla pesi joutsenia.

Se trans la tombo estas vivo... Jos haudan tuolla puolen on elämää...

Käteviä sanontoja:

la transa trotuaro vastapäinen jalkakäytävä

la transa mondo tuonpuoleinen maailma
la trans|river|ano|j ne jotka asuvat joen toisella rannalla

CIS (=maltrans) tällä puolen

Ĉu Jekaterinburgo situas cis aŭ trans Uralo? Tähän Suomessa vastattaisiin ”Ĝi situas trans Uralo” (se on Uralin tuolla puolen) ja Kiinassa ”Cis Uralo”!

Restu cis tiu linio! Pysy viivan tällä puolen/ Älä mene tuon viivan yli!

Jos haluat lisää esimerkkejä, niin tralegu la tutan artikolon tai ota PIV ja katso.

Ili iris tra la longa strato. He kulkivat pitkän kadun päästä päähän.

Ili ne iris trans la straton. He eivät ylittäneet katua/ eivät menneet kadun poikki toiselle puolelle.

Tra unu orelo la babilado eniris, tra la dua ĝi eliris. Pulina meni toisesta korvasta sisään ja toisesta ulos.

La bebo ploris tra la tuta nokto. Vauva itki läpi yön.

Ĉu vi tradancis la nokton? Tanssitteko aamuun asti?

Ĉu vi trapasis la ekzamenon? Menikö kokeesi läpi? Tuliko hyväksytty numero?

transporti kuljettaa (paikasta toiseen), *transplanti* siirtää/istuttaa (toiseen paikkaan), *transpreni* ottaa (toisen) tehtävä ja jatkaa sitä.

Ja lopuksi pari sananpartta. Kun keskustelijat hiljenevät tuokioksi, niin joku voi sanoa: *Traflugis anĝelo preter la orelo.*

Ja kun joku liiaksi ihastelee vieraita oloja, niin toinen voi huomauttaa: *Ĉio transmara estas ĉarma kaj kara.*

Ĝis reskribo! (ei CIS!)

Saliko

AŬTUNAJ TAGOJ

28.-30.9. 2001 EN HELSINKO

—LINGVOJ KAJ (MIS)KOMPRENOJ—

- ◆ Lingvaj temoj prelege, kurse, lude, kvize
- ◆ Abunda arta programo
- ◆ Sufiĉaj lunĉoj, kafoj, liberoj, babiloj
- ◆ Patrik Austin, Dolĉamar, Fabienne Berthelot, István Ertl, Anja Karkiainen, Jouko Lindstedt, Persone, Anna Ritamäki, Variantoj, Bertilo Wennergren
- ◆ En la urbocentro de Helsinko
- ◆ En la internacia kulturcentro Caisa

Novajoj

Anja Karkiainen

Dum la Aŭtunaj Tagoj muzikaj kaj beletraj prezentoj de Anja Karkiainen. Ambaŭterene ŝi gajnis premiojn en la Belartaj Konkursoj de UEA, sed malofte ni aŭdis ŝin en Finn-ujo.

Bafa Bafa

Kio estas tio? Bafa Bafa estas rolludo, aktiva programero inter prelegoj. Spertu renkonton de du malsamaj kulturoj per Bafa Bafa, simulludo. Enkonduko, konatiĝo kun la propra kulturo, reciproka vizitado inter du kulturoj, diskuto pri spertoj. Gvidos Fabienne Berthelot kaj Anna Ritamäki.

Ne-lingvaj esprimoj

Ne ĉio vorte direblas. Parto de komunikado konsistas el gestoj, mienoj, voĉtonoj, korpo-

lingvo. Dum la AT praktikaj ekzercoj pri la temo. Gvidos Katja Lampinen.

Lingva bazaro

Inter helsinkaj esperantistoj troviĝas spertuloj pri kelkaj al ni malpli konataj lingvoj. Dum la AT vi havos la eblon kurte konatiĝi i.a kun la ketŝua (Sakari Kauppinen) kaj la amhara (Pipsa Ahonen).

La plej aktualajn AT-novaĵojn sekvu en www.esperanto.fi/helsinki

Programo

Vendredo 28.9.2001

- 17-19 Vespermanĝo por la alvenontoj
18.00-18.30 Malfermo
19-19.45 Prelego: Esperanto kiel hejma lingvo (Jouko Lindstedt)
20.00-20.45 Prelego: Kiaj estas esperantistoj sociopsikologie? (Fabienne Berthelot)
21.00-22.00 Teatra vespero: Gastamo de Spomenka Stimec (Variantoj)
22.00- Libera vesperumado en la kulturcentro Caisa ĉe kafo, teo, biero ks.
23.00- Rokkoncerto: Dolĉamar. En rokklubejo Factory, aparta enirpago ĉe pordo, 20mk

BONVENON AL LA AŬTUNAJ TAGOJ EN HELSINKO!

Sabato 29.9.2001

- 9.00-9.45 Prelego: Lingva diverseco (Jouko Lindstedt)
- 10.00-10.45 Prelego: Problemoj de internacia komunikado (Fabienne Berthelot)
- 11.30 Kurseto kun praktikaj ekzercoj: Nelingvaj esprimoj (Katja Lampinen)
- 12.30-13.00 Prelego: Kial gramatikaj reguloj – ĉu nur por turmenti nin? (Bertilo Wennergren)
- 12-14 Lunĉo
- 14.00-18.00 Rolludo: Bafa Bafa (Fabienne Berthelot/Anna Ritamäki)
- 15.30-16.00 Kafopaŭzeto
- 14.30-15.30 Filmo: Historio de esperanta kinoarto
- 16.00-16.30 Prelegeto: Konatiĝo kun historio de esperanta muziko (Riitta Hämäläinen)
- 17.00-17.30 Literatura prezento: Du literaturaj skandaloj (Istvan Ertl)
- 17.00-19.00 Vespermanĝo
- 19.00-20.00 Arta vespero: Poemoj kaj muziko (Istvan Ertl, Anja Karkiainen)
- 20.00-20.40 Lingva kvizo: Teamoj de Caisa + esperantistoj (Bertilo Wennergren/Riitta Hämäläinen)
- 21.00-24.00 Vesperumado: Dancado kaj kurta dancinstruado pri salso, tango, valso, jenko, polko, polsko, bambo. Dancadon gvidas: Patrik Austin, Riitta Hämäläinen, Ritva Sabelli. Biero, kafo, limodado kaj babilo sengvide.

Dimanĉo 30.9.2001

- 9.00 Diservo en Tuomiokirkon Kappeli
- 10.00-10.45 Prelego: Nordiaj lingvominoritatoj (Patrik Austin)
- 11.00-11.30 Kurseto: Enkonduko al esperantaj ekkrijoj (Istvan Ertl)
- 11.30-12.30 Lingvobazaro: Rapida konatiĝo kun kelkaj lingvoj, i.a la amhara (Pipsa Ahonen) kaj la ketŝua (Sakari Kauppinen)
- 12.00-14.00 Lunĉo
- 14.00-15.00 Prelego: Kiom viva estas Esperanto? (Patrik Austin/Istvan Ertl)
- 15.00-15.30 Kafopaŭzo
- 15.30-16.30 Akustika koncerto: Persone
- 17.00 Sporto: Maĉo en "kyykkä" por FEJO-anoj kaj aliaj vesperumemuloj (Hanna Helén)

Tervetuloa Syyspäiville myös aloittelijat! Osa ohjelmasta menee varmasti ohi ymmärryksen. Silti mukaan kannattaa tulla. Syyspäivillä on ainutlaatuinen tilaisuus kuulla esperantoa käytännössä, puhua ulkomaalaisten vieraiden kanssa ja tutustua kotimaisiin harrastajiin. Ohjelmassa luentoja, kursseja, teatteria, konsertteja, kirjallisuutta, tanssia, vapaata oleilua. Ilmoittautumislomakkeen saat Esperantolehden numerosta 3/2001 tai osoitteesta www.esperanto.fi/helsinki

Syyspäivien jatkot Lapissa!

FEJO on järjestämässä nuorisolle syksyistä vaellusretkeä Lappiin. Näillä näkymin matkaan lähdetään heti Syyspäivien jälkeen eli 30.9.-7.9. Parhaiten pysyt perillä järjestelyistä seuraamalla FEJO:n sähköpostilistaa.

Voit kysyä lisää Patrikilta, <patrik.austin@helsinki.fi> tai Katjalta, <katja.lampinen@edu.stadia.fi>.

Sähköpostilistan liittymisohjeet löydät internetistä osoitteesta <<http://groups.yahoo.com/group/fejo>>.

Beletremula rondo de FEJO aktivas: interhomaj rilatoj

La beletremula rondo de FEJO kolektiĝis dum la printempo kvarfoje. Ni komencis la agadon de la rondo per la novelo de Spomenka Štimec, **Do... gratulon!** La plejparto de la partoprenantoj jam konis ĉi tiun verkiston, ĉar ŝi ankaŭ verkis la teatraĵon *Gastamo* kiun ni prezentis dum KEF kaj reprezentos dum Aŭtunaj Tagoj de EAF. Kelkaj membroj konatiĝis kun Štimec iom pli profunde jam antaŭe kaj Jukka tiam nomis ŝian stilon "lamenta stilo". Pri tio ni ĉiuj tamen ne tute konsentis.

Laŭ la antaŭinformoj *Do... gratulon!* devis temi pri ĵaluzo. Kiam mi legis la novelon la unuan fojon, mi pensis ke temus pri geedza paro kaj miregis kiam mi finlegis pli ol unu trionon kaj nur aperas du lernejanaj knabinoj. Do, poste evidentiĝas, ke jes temas pri ĵaluzo, sed ne inter geedza paro aŭ korgeamikoj sed inter du amikinoj. La ĉefpersonoj en la novelo estas du knabinoj, "la plej bonaj amikinoj en la klaso". Biba kaj la rakontanta virino kreskas pli-malpli kune kaj finfine Biba fianciĝas, sed ne tuj rakontas tion al ŝia plej bona amikino, pri kio la rakontantino tristiĝas.

Dum nia renkontiĝo ni sufiĉe multe parolis pri tio, kio vere okazis. En la novelo la vidpunkto ja klare estas tio de la anonima amikino de Biba. Ŝi rakontas, ke Biba estis tiom bela kaj lerta kaj sperta en ĉio kaj ŝi mem estis nenio. Do, fakte jam ekde la komenco de la rakonto videblas signoj ke la amikeco eble ne estis tiom bona kaj profunda kiel aspektis. Kaj ni konkludis, ke fakte Biba trompis sian plej bonan amikinojn jam antaŭ ol ŝi trovis la fianĉon kiu nur estis la lasta punkto de la malgaja historio.

Tamen kiam mi poste pensumis la rakonton, mi trovis ankoraŭ unu vidpunkton. La anonima virino nun rakontas pri okazaĵoj en lernejo, do pri la pasinteco de antaŭ almenaŭ 5-10 jaroj. Ŝi nun vidas la pasintecon per la okuloj de la nun-

eco en situacio, en kiu ŝi ĵus eksciis, ke ŝia plej bona amikino intencas geedziĝi. Tial eble ne ĉiuj signoj kiujn ŝi nun interpretas sufiĉe negative ne evidentiĝis tiaj kiam ili vere okazis. Tamen, kiel Jukka prave diris: ne ja tiom gravas, kio vere okazis, sed kian senton la rakontistino nun havas. Kaj ŝia sento ja klare estas, ke ŝia plej bona amikino trompis ŝin kaj ŝia fianĉo nun anstataŭigas ŝin.

Do, la rakonto ne temas nur pri ĵaluzo sed ankaŭ pri amikeco. Ni konkludis, ke eble la anonima knabino ne komprenis, ke amikeco inter du knabinoj en lernejo ŝanĝiĝas dum jaroj kaj fariĝas alispeca. Ŝi volis ĉiam havi la proksiman rilaton al Biba, sed Biba sufiĉe klare montris ke ŝi ne plu emis. Ni ankaŭ diskutis pri tio, ĉu povus same okazi kiam temas pri amikeco inter knaboj kaj la rezulto estis ke verŝajne ne. La ĉefa kialo por tio evidente estis, ke knaboj fiŝkaptas... Pli serioze knaboj eble ne tiom ofte havas duopan amikecon sammaniere kiel knabinoj, sed ili agas en iom pli grandaj grupoj. Cetero eble knaboj pli multe faras aferojn kune, sed knabinoj ankaŭ parolas kaj la rilato inter ili fariĝas iel pli intima.

Dum la dua renkontiĝo ni translokiĝis el amikeco al amrilatoj. Ni legis tiun fojon eĉ du noveloj kiuj ambaŭ temis pri malfideleco: **Marta kaj Maria**, kiun verkis Liven Dek kaj **Kokro kokerikas jam** verkita de Gonçalo Neves. Ambaŭ noveloj temis pri unu viro kaj du virinoj kaj la ĝenerala temo similis, sed kaj la ĉefa ideo kaj la lingvaĵo en la noveloj tute malsamis.

Marta kaj Maria rakontas pri du fratinoj, unu el kiu edziĝas. Kiam Marta ne trovas al si edzon, Maria decidas donaci sian edzon al sia fratino. La simileco de tiu ĉi novelo kun la rakonto pri Marta kaj Maria en Biblio estas grandega kaj mi pensas, ke Dek preskaŭ certe ekpensis la novelon pere de la biblia rakonto. Unu el la intere-

saj aferoj estis la vortoj: ”rigardu Marian kiu elektis la bonan parton” en Biblio. Estus amuze kompari ĉu tia ideo ankaŭ videblas en la novelo de Dek aŭ ĉu nur la ĝenerala temo pri du viroj ĉirkaŭ unu viro kiun ili ambaŭ amas. (Bedaŭrinde mi forgesis fari tion kaj nun mi devas fini la artikolon antaŭ ol mi havas tempon fari la komparon.)

Kokro kokerikas jam estis laŭ mi eble eĉ pli malfacile komprenebla ol *Marta kaj Maria*. La lingvaĵo de ambaŭ noveloj estis sufiĉe malfacila, kaj krome almenaŭ mi miksiĝis iom pri tio, kiu faris kion kun kiu kaj kiam. La ĉefa strukturo estas en tiu ĉi rakonto, ke viro kiu nomiĝas Fernando umas samtempe kun du virinoj, kiuj komence ne scias pri unu la alia. Helena kaj Eŭgena tamen enamikiĝas kaj ekscias pri la afero. Ili decidis aranĝi surprizon por Fernando, sed finfine Fernando denove trompas ilin ambaŭ.

En tiu ĉi renkontiĝo ni iom parolis pri tio, kial oni pli bone akceptas tion, ke viro estas malfidela ol tion ke virino estas. Ni proponis la ideon pri virino kiel patrino de infanoj kiu ne rajtas lasi ilin, do iaspeca madonna-bildo, sed ĝi ne estis akceptita de ĉiuj ĉe-estantoj. Ankaŭ ni parolis pri tio, ke fakte la sintenoj formiĝas jam kiam geknaboj havas korgeamikojn. Se knabo umas kun multaj knabinoj, oni ne malŝatas tion. Sed kiam knabino umas kun pluraj knaboj eĉ sinsekve, ŝi estas konsiderata malbona. Do, la konkludo eble estis ke oni daŭre malsame pensas pri viroj kaj virinoj en nia kulturo.

Se vi bedaŭras ke vi maltrafis ĉiujn ĉi tiujn renkontiĝojn kaj daŭre emus veni, bonvenon denove aŭtune. Tiam denove novaj tekstoj kaj eble ankaŭ novaj partoprenantoj.

Hanna Helén

La unua aŭtuna legorondo kolektiĝos 5.9 je 17.30 en la oficejo. Ni parolos pri la komikso “Doktoro Esperanto serĉas la Bonan Etoson” de Arnau Torras. La komiksa albumo haveblas de Hanna: <hanna.helen@mission.fi>.

Aŭtuna programo de Esperanto-Klubo de Helsinki

18.8 Kulturpromenado ĉirkaŭ la golfo de Töö-lö. Renkontiĝo je 15.00 ĉe la stacidomaj pordoj vidalvide al la ĉefpoŝtejo. Gvidos Sakari. Poste bierumado en la urbo.

28.8 Vinvespero. Gustumado de blankaj vinoj je 18.00 en la oficejo. Nepras antaŭanonci sin al Eeva: <evaijarvi@yahoo.com>.

5.9 Legorondo de FEJO. Je 17.30 en la oficejo.

8.9 Ekskurso al Nuuksio. Ekveturo matene. Pliaj informoj aperos en la retpaĝoj de EKH.

28.-30.9. Aŭtunaj Tagoj en Caisa

13.-14.10 Esperantokurso en Stoa (elementa). Instruas Riitta. Aliĝoj al Stoa.

27.10 Bierkulturo. Konatiĝo kun bieraj gustoj kaj sekretoj je 16.00 en la oficejo. Gastpreleganto Jukka Laaksonen. Nepras antaŭanonci sin al Riitta: <riitta@arctinar.com>.

10.11 Vizito al Nacia Muzeo. Renkontiĝo je 16.00 ĉe la pordoj de Nacia Muzeo.

17.-18.11 Esperantokurso en Stoa (daŭriga). Instruas Riitta. Aliĝoj al Stoa.

15.12 Julfesto de EKH: Telero de gustoj + literatura temo. Kiel kongruas gustoj dolĉaj, amaraj, salaj kun diversaj vinoj? Gvidas Eeva. Literatura temo anoncota poste. Je la 16-a en la oficejo. Nepras antaŭanonco al Eeva.

Ĉiumarde teumado en la oficejo je 17.00 kaj Biero & Babilo en Cotton je 19.00.

Novaĵoj de Steleto

La adreso de la prezidanto ŝanĝiĝis. La nova adreso estas: Raimo Tanskanen, Uudenkyläntie 827, 29630 Pomarkku.

Steleto havas novan konton ĉe Nordea: 101230-213247.

Ritva Sabelli

Esperanto en Metsäkylä

En januaro ni kaj Pääatalo-Instituto lanĉis la duan esperantlingvan fabelkonkursanoncon. Ĝi estis sendita almenaŭ en Esperantolehti, Juna Amiko kaj ret-info.

Aini daŭrigis instruadon en civitana lernejo, nun estis tri plenkreskuloj kaj kvar infanoj en la rondo. Fine de la studsezono ni havis esperantokantadvesperon en Arbar-Bar-trinkejo. Krom ronduloj aldone partoprenis du ”eksterulinoj”.

Infanoj de la grupo partoprenis desegnaĵkonkurson kiun aranĝis Esperanto en Vendemois, Francio.

Ĝis nun nia grupo dufoje partoprenis la konstantan konkurson de la revuo Juna Amiko. Ni daŭrigos partoprenadon.

Fine de majo vizitis 43 pensiuloj de Taivalkoski en Halkola, kiu estas centro de Esperanto-agado de nia regiono. Aini aranĝis por ili etan libroekspozicion kaj rakontis pri Esperanto. Homoj interesiĝis. Estis artikolo en la loka gazeto Koillissanomat.

En la 26-a de junio alvenis la slovaka grupo de 34 homoj al Taivalkoski per aŭtobuso. Ili venis el Nordkapp tra Inari kaj Rovaniemi. En Rovaniemi ilin gvidis Marja-Liisa Parpala. Tie ili vizitis almenaŭ en Ounasvaara. – La vojaĝon aranĝis la Esperanto Societo de Poprad, kiu estas urbo kun 10 000 loĝantoj. Estis esperantistoj kaj naturemuloj en la grupo. Ni renkontis

apud la preĝejo de Taivalkoski, kie mi ĉiam renkontas miajn eksterlandajn gastojn. Mi vidis verdan stelon sur la fenestro de aŭtobuso – saman signon mi havis surpapere en mia mano – samideanoj!

Unue ni ĉiuj vizitis en la Arbaro de Zamenhof, kie ni havis arboritualon, do miaj gastoj elektis la arbon de Slovakio. Feliĉe ne estis multmultaj kuloj tiam.

Poste ili rigardis la libroekspozicion, poste loĝiĝis en du domoj kaj en tri somerkabanoj. Nokte iuj venis kun mi kiam mi iris al la rivereto kaj donis manĝaĵon por miaj fiŝoj. Longe ni diskutis – tiom multe ni ŝatis scii pri la landoj de unu aliaj kaj tiom malmulte ni havis tempon. Matene ni unue vizitis vilaĝvendejon kaj Arbar-Bar-trinkejon. Kiel la fina programero ni vizitis argillaborejon de nia vilaĝo. Iom mi ploretis kiam ni devis disiĝi – tiel amuzaj estis homoj en tiu grupo el malproksima Slovakio. Ili daŭrigis al Helsinko kie ilin gvidis almenaŭ Heta Kesälä. Post Helsinko ili marvojaĝis al Estonio, kaj tra Kaunas hejmen al Slovakio.

En 28-an de junio okazis la oficiala malfermo de esperantoliteraturekspozicio en Halkola. La malfermo estis unu programero de Pääatalosemajno. Partoprenis ok interesiĝitaj. Delegito de la komunumo Taivalkoski kaj Pääatalo-Instituto etendis florbukedon por Aini.

Aini Vääräniemi

Biblioteko – novakiroj

Lernolibroj:

Ĉu vi volas paroli flue? Konsiloj por memlernantoj de Esperanto. Surbaze de la sperto el kelkcento da Esperanto-kursoj kaj ĵurnalista laboro en Pola Radio. Varsovio 1994. 18 p.

Flugu kun Petro. Demandu kaj respondu. Charlotte Kohrs. 1995. 9 p.

Kantu Esperante kun Janico kaj Johano. 12 Konversaciaj Kantoj por Komencantoj. Charlotte Kohrs. San Diego. 17 p.

Let's talk Esperanto. Charlotte Kohrs. San Diego, California. 1990. 4 p. (A4)

La bela planedo. Demandu kaj Respondu! Charlotte Kohrs. San Diego, California. 17 p.

Look sharp. Ĝeneralaj scioj. International Language School. Budapeŝto 1990. 36 p.

Historio, politiko: La flago el Krasny Sulin de Ursula Gärber. Tonndorf 1979. 31 p.

Religio: Nia historio. K.E.L.I. de 1911-1961. H.A. de Hoog. 159 p.

Ritva Sabelli

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☎ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ Ritva.Sabelli@sfs.fi ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2001**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Zagreba adiaŭo

*Homoj el la tuta mondo
per la Esperanta ponto
en Zagrebo kune estis,
interkompreniĝon festis.*

*Konferencis en kunvenoj,
foliumis en bultenoj,
elektadis la salonojn,
pligrandigis siajn konojn.*

*Dancis gaje dum la balo,
preĝis en la katedralo,
por la estonteco planis
aŭ nur aŭskultante anis.*

Migris alte Medvednice,
staris, sidis longavice
en areg' ĉemonumente**
teatreje bonasente.****

*Post sep tagoj multeventaj
kaj renkontoj plenplensentaj
indus ion plion sopiri,
sed – jam horo por disiri.*

*Ĝis revido, Kroatio,
dankon diras ni pro ĉio;
al Zagrebo: Adiaŭon!
Al ni ĉiuj – pacmorgaŭon.*

Franz-Georg Rössler (asteriskoj kaj piednotoj de Saliko)

*Citaĵo el Kongresa kuriero ALBUMO 7. *Medvednica-monto apud Zagreb. ** Statuo LA FUTURO. ***E-lingva teatraĵo pri imperiestrino Maria Terezia en la Nacia Teatro, ĉefrole Vida Jerman.*

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy lokakuun alussa. Jutut 15.9.2001 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de oktobro. Artikoloj ĝis 15.9.2001 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.